

# FORSTISTA INFORMILO

de INTERNACIA FORSTISTA RONDO ESPERANTLINGVA

Nr. 2 Eberswalde, 1982-11-30

---

Laŭ la resenditaj slipoj kaj aldonitaj leteroj ni kredas, ke la FI 1/1982 (1/1981 estis eraro) trovis ĝenerale la konsenton de kunlaborantoj. Ĉi tie nia opinio al la diversaj proponoj:

- La slipo kun la lingvoj ni sendis nur, por ke indiki la vicon de lingvoj sur la slipoj. Ne estis limigo de nombro de lingvoj. Kompreneble estus bona, se ni povus enlistigi en la laborgrupo E-forstistojn de aliaj gepatraj lingvoj. Tiel ni povus altigi la nombron de lingvoj. Sur la dektria linio staras nun la rumana nocio.
- Ni opinias, ke la kvinlingva vortaro de Weck estas la plej bona bazo por nia tasko laŭ la nuntempaj laborkondiĉoj de nia fakgrupo. Ni kompletigos la slipojn helpe de aliaj arbarmastrumadaj vortaroj. Laŭ la resenditaj slipoj ni vidas, ke ni disponas en la IFE (Institut für Forstwissenschaften Eberswalde) pri la plej granda nombro de vortaroj. Ni uzos por la unua eldono de slipoj la vortarojn no. 1 ĝis 6 de "Bibliografio".
- La propono kaj deziro prizorgi vortaron de Weck por ĉiuj kunlaborantoj estas komprenebla kaj estus dezirebla, sed estas ne realigebla.
- Kiel aldono de FI 2/1982 ni komencas publikj "Bibliografion de arbarmastruada literaturo". Ĝi entenus ĉiuj verkoj, kiuj necesas por nia tasko. En krampoj ni donos la mallongigon kaj la personon aŭ bibliotekon, kiuj disponas pri ekzemplero.
- Ni provos realigi la mallongigojn de aŭtoroj per du literoj kaj se ili ne sufiĉos per tri literoj.
- Por ke faciligi la utiligon de la slipoj ni petas skribi en la dekstran malsupran angulon vian signon (dz, cr, si).
- Por ke fari plej eble uzeblan (kaj vendeblan) vortaron nia celo estas 2000- 3000 nocioj. Ekster unu kunlaboranto ĉiuj akceptis la proponom.
- Por ke redukti la nombro de nocioj en WE, ni forlasis (kaj forlasos) la kompletigado de koncernaj nocioj (ekz. 0002 "abbrennen" sen "flächenweises", "streifenweises").
- Samideano Marino proponis kompletigi la slipojn per tekston, por ke klarigi la fakterminojn. Estus dezirebla. Sed eĉ en la JUFRO ne estis ebla fari unueco de arbarmastrumadaj terminoj. La indiko de teksto sur slipoj supereas nian potencon en la nunc tempo. Kelkaj elektitaj nocioj ne estas tre kutima en la altindustriaj landoj, sed hodiaŭ ekzistas ankoraŭ landoj, kiuj ne disponas pri moderna tekniko. Tial la farenda vortaro ankaŭ devus enhavi vortojn basantaj sur simpla tekniko.
- La genro de substantivoj devas esti indikata kompreneble nur en lingvoj, kiuj necesas la indikon. En vortaroj la verboj estas cititaj por multaj linvoj kiel infinitivoj kiel en la gvidlingvo germana en la vortaro de J. Weck. Por kelkaj lingvoj kiel hungara lingvo oni uzas konjugativa formo. Ni ankaŭ faros.
- La anstataŭigo de slipo estos indikita per postmetitaj ciferoj (ekz. 0001.1; 0001.2).
- La necese koditaj ekvivalentoj de literoj estis akceptitaj de ĉiu j kunlaborantoj. En la listo mankas la kirila litero P = R en latina alfabeto. La kodita ekvivalento por la kirila litero b estas ` . Kompreneble la koditaj literoj devos esti presataj en la origina formo. Se necesas menci terminon donitan aliloke, ni indikos per \* asteriko. Pro la kodado de diakritaj signoj per ciferoj, aliaj ciferoj en la teksto de slipoj ne estas permesita.
- Kelkaj proponoj celas limigon, faciligadon kaj akceladon de nia tasko per distribuo de la vort-trezoro laŭ la alfabeto, subfakoj aŭ grupoj de similaj esprimoj. Bedaŭrinde ne estas ebla. Nova vicigo de nocioj altigus la labor-elspezoj por nia malgranda Ebersvalda grupo kaj dispartigo ne estas ebla, Ĉar la unuopaj kunlaborantoj traktos krom E iun specialan lingvon. Tial Ĉiu ano de la laborgrupo devas rivas ricevi ĉiujn slipojn.

- Se vi proponos por unu nocio du aĉ plurajn terminojn, la preferata estus metita unualoke. Se slipo jam enhavas plurajn terminojn, bonvolu substreki la terminon, kiun vi preferas, kaj trastreki la terminon, kiun vi malaprobis. En la kazo de apero de malfacilaĵoj pro la definitiva fiksado de terminoj, ni proponas konsili la procedon sur konvenon de nia laborgrupo.
- Kunveno de Ĉiuj kunlaborantoj prosperigus nian laboron, sed estas malfacile realigi. Ni proponas renkontigon okaze de IFER '83 (Internacia Foira Esperantista Renkontigon) en Leipzig. IFER okazas laŭ tradicio senpere antaŭ la komenco de la printempa foiro. La Ĉef-temo de IFER '83 (1983-3-11/13) estos Wenkintoj en la historio. Sed Ifer enhavas ankaŭ fakkonsidojn de komputista fakrondo, medicina fakrondo k.t.p. . La aliĝilon por IFER '83 petu ĉe la Organiza Komitato de EFER, DDR-7010, Leipzig, Käthe-Kollwitz- Str. 115. Alia okazo de renkontigo povus esti la 68-a

#### UK de Esperanto en Budapeŝto.

La rekomendon publikigi kompletajn adresojn de la forstisto-kunlaborantoj, ni volonte sekvas. Ni donas nun la adresojn de anoj, kiuj resendis ĝis nun la provo-slipojn:

HINZ, Dietmar, DDR-2100 PASEWALK, Rothenburger Weg 12; PF 150

LANDMANN, Lutz, DDR-1300 EBERSWALDE-FINOW 1, Rosa- Luxemburgstr. 17

MARINOV, ing. Boris, BULGARIE 4600 NEUNGRAD; str. "Puccini" 6 >

MASEROV, Stefan, BULGARIE 1113 SOFIA; Bulv. Lenin 83, v. A

OROSZI, Sándor, H-5300 KARCAG; Kisujszállási ut 11

PACHTER, Dipl.-Forsting, (FHW), Johann Andreas, D-8960 KEMPTEN (Allgäu) ; Burg Schwabensberg

SIMON, Dr. Karl-Hermann, DDR-1300 EBERSWALDE- FINOW 1; C.- v.- Ossietzkyst. 21

STEINERT, Ursula, DDR-1300 EBERSWALDE- FINOW 1; Sommerfelder Str. 19

SVOBODA, Ing. Milan, CS-570 01 LYTOMYSĽ; A. Zápotockého 462

ULLRICH, Dipl.-Forsting. Ingward, DDR-6110 HILDBURGHAUSEN; Am Feldrain 11/ 54-20

WECKWERTH, Dr. Horst, DDR-1300 EBERSWALDE- FINOW 1; Wilhelm-Pieck-Str. 3.

- Ni opinias ke FI devus ne nur orano de la Ebersvalda grupo, sed de la tuta internacia laborgrupo. Ĉiu estas invitita sendi kontribuojn, se li deziras publikigi en FI.